



Nia E-Asocio en la inform-medioj

Aida Álvarez, subskribanta plejmultajn intervjuojn de la kolumno "En corto" ("persone proksime") de la ĵurnalo "El Comercio", invitis nian Asocion por unu tia intervjuo. Ĝi okazis fine de monato aprilo, en nia tiama sidejo; ĉeestis ĝin Eduardo, Celia kaj Marián (lernantoj en nia Baza Esperanto-kurso) kaj Faustino (instruisto), krom mi kaj Aida, mia edzino.

L' intervjuo estis neformala parolado inter Aida kaj ni dum proksimume duonhoru. La demandoj temis pri la historio de Esperanto kaj nia Asocio, pri la trajtoj de la lingvo (ĉefe ĝia lernofacilo), kaj tiel plu.

Oni publikigis l' intervjuon la trian de majo de 2007 kaj eblas ĝin legi en jena interreta adreso:

<http://www.elcomerciodigital.com/prensa/20070503/gijon/esperanto-facil-aprender-20070503.html>

Bedaŭrinde, ĉar la formato de "En corto" postulas unu-homan intervjuon, Aida redaktis kvazaŭ nur mi partoprenus. Tiel pensigas ankaŭ la duonvera publikigita foto ("duonvera" ĉar maldekstre de mi staris la ceteraj partoprenantoj).

Malmultajn semajnojn post tiu intervjuo de "El Comercio" (la dudekvaran de majo) min telefonis ĵurnal-

isto de TPA (Televido de l' Asturia Princlando) por raporti pri nia Asocio. Ĉi-foje, ni rendevuis en Oviedo, en l' Universitata Kampuso Llamaquique, kie ĉi-jare disvolviĝas la Esperanto-kurso en Oviedo.

Ĉeestis ĵurnalisto Consuelo Carrasco kaj kameraisto (kies nomon mi ne memoras, mi bedaŭras) kaj Aliflanke Dijna kaj David (lernantoj) kaj mi (instruisto).

Pro televide, ĉi tiu intervjuo postulis l' agordon de pluraj teĥnikaj aferoj: mikrofonoj, alĝustigi la lumon, filmado de materialojn en Esperanto (libroj, diskoj, revuoj)...

Consuelo demandis al ni pri Esperanto, nia Asocio,

k.t.p. Kurioze, ŝi scipovas la signolingvon por surduloj. Ni komparis la situacion de ĝi kun tiu de Esperanto, ĉar oni povas konsideri ilin ambaŭ "minoritataj lingvoj". Ŝi diris ke la signolingvo almenaŭ estas oficiale agnoskita por komuniki kun la ŝtata administracio.

La intervjuo daŭris proksimume kvindek minutojn (inkluzive de la teĥnikaj agordadoj) kaj kiam ĝi estos elsendata ĝi daŭros proksimume du minutojn, fine de la ĉiutaga programero "TPA novaĵoj".

Carlos E. Carleos Artime

